Sceno 3

Karlo: Ni estas amikoj.

Ambaŭ: Kune vi kaj mi
Amikoj estas ni.
Mi kaj vi,
Pli kaj pli,
Amikoj estas ni! *(ripeto)*
Du amikoj ni!

Karlo: Rigardu!

Mazi: Kion?

Karlo: Jen, tion, supre!

Mazi: Kion?

Karlo: Jen, bongustaj stangoj!

Mazi: Ho, ne. Dankon, ne!

Karlo: Jes! Manĝu la stangojn!
Unu, du, tri, kvar, kvin!
Ni estas liberaj!
Vi estas libera kaj ankaŭ mi!
Ni estas liberaj!

Mazi: Libera vi, libera mi, liberaj estas ni!

Karlo: Liberaj ni, vi kaj mi, Liberaj estas ni!

Mazi: Liberaj...

Karlo: Estas ni! Ek!

Ili saltas el la malliberejo

Ambaŭ: Mi kaj vi...

Mazi: Mi estas libera! Mi sentas...
malvarmon, malsaton, sed mi estas libera!

Sceno 4

Petro: Malvarma!
Varma!
Malsata!
Soifa!
Malseka!
Seka!



Sceno 5

Petro: Mi soifas!

Virino: Trinku akvon!

Petro: Tre varma!

Virino: Pardonu!

Petro: Mi malsatas.

Virino: Manĝu sandviĉon!

Petro: Mi ŝvitas!

Virino: Duŝu vin!

Petro: Mi malsekas!

Virino: Viŝu vin!

Petro: Mi sentas malvarmon.

Virino: Surmetu puloveron.

Petro: Mi estas laca!

Virino: Ripozu!

Sceno 6



Mazi: Brrr! Mi malvarmas! Karlo!
Karlo? Kie vi estas? Karlo!

Karlo: Mazi!

Mazi: Karlo! Kie vi estas?

Karlo: Ĉi tie!

> ***Kiu*** *can mean "which"*
> Sur **kiu** arbo?
> Sur la arbo, sub **kiu** vi staras!



Mazi: Kie? Mi ne vidas vin!

Karlo: Mi estas ĉi tie, sur la arbo.

Mazi: Sur kiu arbo?

Karlo: Sur la arbo... sub kiu vi staras? Aj! *(li falas)*

Mazi: Mi estas... sub...

Sceno 7

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: Sub la kesto.

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: Sur la kesto.

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: En la kesto.

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: Antaŭ la kesto.

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: Malantaŭ la kesto.

Voĉo: Kie vi estas?

Petro: Inter la kestoj.

Voĉo: Kie estas la kesto?



Petro: Tie!

Voĉo: Kie la kesto estas nun?

Petro: Ĉi tie!

Sceno 8

Karlo kaj Mazi apud la rivero.

Karlo: Kiel vi fartas?
Kiel vi fartas?

Mazi: Tre bone! Kvankam mi estas malseka kaj malsata!
Kie estas la palaco?

Karlo: Jen, tie!

Mazi: Kie?

Karlo: Rigardu, ĝi estas tie!
Ho, la palaco!
(suspiro) Silvja estas tie!

> ***Kiel*** *= How, in what way, in what manner*
> Kiel vi fartas? —Mi fartas bone.
>
> ***Tiel*** *= in that way, in that manner, so*
> Portu ĝin tiel. *(Carry it like this.)*
> Vi manĝis tiel rapide! *(You ate so quickly!)*